

En la PDF-versio povas manki kelkaj partoj de la enhavo.

Enhavo

1	Aranĝoj	2
1.1	Pri eŭropa lingvopolitiko en Kopenhago	2
1.2	Fakaj kontribuoj kadre de la 88-a UK	2
1.2.1	Klerigaj seminarioj	2
1.2.2	56-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato	3
1.2.3	Esperantologia konferenco	4
1.2.4	Strategia Forumo: Rolo de la scienco	4
1.2.5	Terminologia Forumo	5
1.3	Simpozio pri interkultura komunikado	7
1.4	Pri eŭropa lingvo-politiko en la Parlamentejo de Bruselo	8
2	Prilingva ekspozicio kun sekcio pri planlingvoj en Graz.	10
3	Jubileo de Wilhelm Ostwald (1853-1932)	11
3.1	Konferenco de Idistoj omaĝe al Wilhelm Ostwald	11
3.2	Novaj kontribuoj pri Ostwald kaj la planlingvoj	13
3.3	Kompleta bibliografio de la verkoj de Wilhelm Ostwald	15
4	Vortaroj kaj fakvortaroj	16
4.1	La bibliografio de Ockey kompletigita	16
4.2	Elektronika bibliografio de fakvortaroj en Esperanto 1980-2002 (Ĵeromo Vaŝe)	17

1 Aranĝoj

1.1 Pri eŭropa lingvopolitiko en Kopenhago

Kelkaj lingvopolitike interesitaj interlingvistoj antaŭ la 88-a UK en Gotenburgo havis la eblecon en Kopenhago partopreni seminarion pri lingvopolitikaj temoj (lingvaj rajtoj, protekto de etnaj minoritatoj, eŭropa lingvo-politiko k.a.). Ĝi okazis la 23-an de julio 2003 en *Copenhagen Business School*. Gastigantoj estis la profesoroj *Robert Phillipson* kaj *Tove Skutnabb-Kangas*, ambaŭ internacie renomaj specialistoj pri la temoj. Ili publikigis fundamentajn librojn (kp. IpI 35 kaj 45). La libro de Phillipson pri la eŭropa lingvo-politiko “*English-only Europe?*” post nelonge aperos ankaŭ en Esperanto (ĉe UEA). La lingvoj de prelegoj kaj diskutoj estis la angla kaj Esperanto.

1.2 Fakaj kontribuoj kadre de la 88-a UK en Gotenburgo (26.7.-2.8.03)

Kadre de la 88-a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo/Svedio (26.7.-2.8.2003) okazis diversaj aranĝoj kun interlingvistike interesaj trajtoj. Jen elekto el ili:

1.2.1 Klerigaj seminarioj

Dimanĉe, la 27-an de julio 2003 sub la organiza gvido de *Humphrey Tonkin* okazis 15 seminarioj kun la celo, proponi klerig-eblojn al la kongresanoj.

Interlingvistike aparte interesaj estis la jenaj:

- Esperanto kaj religio (historio de la lingvo-komunumo: *d-ro Leif Nordenstorm*)
- Eŭropa identeco kaj eŭropa lingvo (lingvo-politiko: *Zlatko Tišljar*)
- Svedaj fakuloj rigardas Esperanton kaj la lingvan situacion (lingvopolitiko kaj leksikografio: *prof. Bo Sandelin, Bertil Wennergren, d-ro Ebbe Vilborg*)
- Seminario pri interlingvistiko “Ĉu Esperanto havas konkurencon?” (planlingvoj: *d-ro Detlev Blanke*)
- Literaturo en Esperanto, en Esperanton, kaj el Esperanto (literaturo:

prof. Humphrey Tonkin, Sten Johansson, Anna Löwenstein)

- Esperanto trans la generacioj (du- kaj plurlingvismo: *prof. Amri Wandel*)

- Silentado kaj la movadaj militoj (historio de la lingvo-komunumo:
Ziko Marcus Sikosek)

1.2.2 56-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato

Rektoro de la 56-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato estis *prof. d-ro Christer Kiselman*.

Kadre de IKU estis prezentitaj jenaj prelegoj, kiuj parte ankaŭ apartenis al la kleriga programo de la Akademio Internacia de Sciencoj en San Marino (AIS):

Prof. d-ro Hans Michael Maitzen (Aŭstrio): De UK Malmö (1948) ĝis Gotenburgo (2003): La eksplodo de la astronomia scio dum duonjarcento

Prof. d-ro Lee Chong-Yeong (Suda Koreio): Ekonomia tutmondiĝo – ĉu oportuno aŭ minaco?

Eva Paraŝkeva-Bojaĝieva (Bulgario): Komunikado tra la ĉelaj membranoj

D-ro Detlev Blanke (Germanio): La interlingvistikaj konceptoj de Wilhelm Ostwald (1853-1932) – okaze de la 150-a datreveno de lia naskiĝo

Orlando E. Raolo (Kubo/Usono): Nanoskalaj duonkondukiloj: Kemia prilaborado de materialoj por estonta elektroniko

D-rino Marjorie Boulton (Britio): Manksio: eta lando aŭtonomeca kun propra lingvo kaj kulturo

Prof. d-ro Christer Kiselman (Svedio): La geometrio de la komputila ekrano

D-ro Leif Nordenstorm (Svedio): Ĉu ĉiuj religioj estas sinkretismaj?

Prof. d-rino Meredith Simon (Kanado): Instruado de efikaj komunikaj kapabloj al medicinaj studentoj

La tekstoj de ĉiuj prelegoj aperis en :

Lipari, Michela (2003): IKU. Internacia Kongresa Universitato. Gotenburgo, 26 de julio – 2 aŭgusto 2003 (sic). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, S. 37-46. (Krome vidu : www.bavaresperantoinfo.de/0303/aktuell37.htm , 15.11.03)

1.2.3 Esperantologia Konferenco

La esperantologia konferenco, sub gvido de profesoroj *Humphrey Tonkin* (Usono) kaj *Probal Dasgupta* (Barato), realiĝis en du partoj sub la kadra temo “Esploroj pri esperantologio: Kien iri, kaj per kiuj vojoj?”.

En la unua parto *Ziko Marcus Sikosek*, bibliotekisto de la biblioteko Hector Hodler en la Centra Oficejo de UEA (Rotterdam) informis pri la nuna stato de la biblioteko kaj pri prioritatoj de Esperanto-bibliotekoj ĝenerale.

Komentis *d-ro Ulrich Lins*.

En la dua parto *d-ro Detlev Blanke* prezentis sian monografion “Interlingvistiko kaj esperantologio: vojoj al la faka literaturo” (Esperanto-Dokumento 39E).

Komentis *prof. Probal Dasgupta*.

1.2.4 Strategia Forumo: Rolo de la scienco

La strategiaj forumoj – la unua okazis 1998 en Montpeliero - celas diskutigi problemojn baze gravajn por la lingvo-komunumo.

La ĉi-jara aranĝo klopodis diskutigi la kadran temon “Kiel la scienco helpu nin – kiel ni helpu al la scienco?”, (vidu la enkondukon en n-ro 3/03 de la revuo Esperanto kaj en la Kongreslibro), kio tamen pro la troa vasteco de la temo nur parte sukcesis.

Post enkondukoj de *d-roj Renato Corsetti* kaj *Detlev Blanke*, kiu lasta gvidis la forumon, *prof. Amri Wandel* resumis la argumentojn por la scienca agado per resp. por Esperanto ene de kaj ekster la Esperanto-komunumo kaj donis superrigardon pri la ĉi-koncerna situacio. *José Antonio Vergara* pledis por demokratigo de la scio pri sciencaj aferoj kaj vidis en la Internacia Lingvo

taŭgan ilon por disvastigi novajn ekkonojn en popularscienca formo. *Radojica Petrović* donis informojn pri la interna kaj ekstera agadoj, i.a. de ILEI, kaj atentigis pri la “inkluziva” scienca agado, kie esperantistoj organizas gravajn kolokvojn, kiuj inkluzivas neesperantistajn partoprenantojn.

Pri la graveco de universitata agado kaj la apartaj spertoj, kiujn ŝi akiris per la interlingvistikaj kursoj en la universitato de Poznano, raportis *d-ino Ilona Koutny*. *Detlev Blanke* prezentis la neesperantistan germanan organizaĵon “Societo pri interlingvistiko” (Gesellschaft für Interlinguistik), kiu klopodas kolekti kaj aktivigi interlingvistojn kaj estas malferma al diversdisciplinaj sciencistoj interlingvistike interesitaj. Similaj organizaĵoj eble fondindaj ankaŭ en aliaj landoj povus grave helpi al la celoj de Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), pri kies rezultoj, problemoj kaj defioj raportis *prof. Humphrey Tonkin*.

La diskuto montris la kreskantan konscion pri la graveco kaj samtempe malfacileco de altnivela scienca agado kaj donis multajn utilajn sugestojn, kio ankaŭ esprimiĝis en la konkludaj finvortoj de la prezidanto de UEA.

Cetere, estus bone tre frue pensi pri la kadra temo por la sekva strategia forumo, kiu en la jaro 2004 devus okazi en Pekino. Ĉu eble “Azia rigardo al la Esperanto-komunumo, ties celoj, strukturo kaj evolutendencoj” ?

1.2.5 Terminologia Forumo

La graveco de bona faka apliko de Esperanto, kiu ne eblas sen altkvalitaj fakvortaroj/terminaroj, ĝenerale estas akceptita en la Esperanto-komunumo. Malgraŭ la portempe neplufunkciado de Terminologia Esperanto-Centro (TEC), pri kies revivigo ofte kaj prave aŭdiĝas postuloj, daŭre aperas interesaj eldonaĵoj kaj rimarkeblas pozitivaj faktoj pri faka agado. Tamen ankoraŭ tro oftas individuaj vortaraj laboroj, kiuj ignoras la internacie akceptitajn ekkonojn kaj normojn de bona terminologia laboro. La terminologiaj aranĝoj kadre de la

kongresoj celas helpi plibonigi la situacion. La Terminologia Forumo ĉi-jare en Gotenburgo prezentis kelkajn interesajn rezultojn kaj diskutojn.

Post enkondukoj de la estrarano pri faka agado, ĝenerala sekretario de UEA *Ivo Osibov*, kaj de la organizanto *Detlev Blanke, Marc Bavant* prezentis sian novan matematikan vortaron (kun oklingva leksikono). Ĝi eldoniĝis en la fake ege aktiva firmao KAVA-PECH, kiun gvidas *d-ro Petro Chrdle* kaj kiun tiu poste prezentis. *D-rino Ilona Koutny* informis pri metodologiaj problemoj ĉe la reviziado de lingvistikaj terminoj. Dum la diskuto i.a. estis prezentita la propono de *Miroslav Malovec*, ke oni ellaboru esperantajn terminojn surbaze de la eŭropunia datenbanko Eurodicautom kaj ke oni aldonu ekvivalentojn en la eŭropuniaj lingvoj al la jam ekzistantaj esperantaj vortaroj. Estis krome prezentita sufiĉe akra kritiko de *Jan Werner* pri la situacio de la terminologia agado. Pozitivas tamen ne nur kelkaj lastaj fakaj eldonaĵoj sed ankaŭ la elektronikaj bibliografioj, la 'Esperanto-terminaroj, aperintaj en 1980-2002' (J. Vachey) kaj la 'Bibliografio de vortaroj kaj terminaroj en Esperanto, 1887-2002 (Ockey/Sutton)' (<http://www.uea.org/dokumentoj/bibliografioj.html>).

Inter la kelkaj *modelaj terminaroj* aparte menciindas la nesufiĉe konata "Lexicon silvestre" (forstscienco) (http://w3.forst.tu-muenchen.de/~quednau/lex-silv/lexsilv_eo.html) kaj la "Komputika leksikono" de Sergio Pokrovskij (<http://www.esperanto.mv.ru/KompLeks/Lat1/>). Bona ilo por interrete okupiĝi pri terminologio aktuale estas la "Reta Vortaro" (ReVo) (<http://www.uni-leipzig.de/esperanto/voko/revo/>).

Ne mankis ideoj, sed ja ĉefe kunlaboremuloj. Interteme tamen la juna brazilano Lucas Yassumura (luko@esperantoland.org) faris novan provon, vidu ĉe www.terminologio.subito.cc. Eblas aliĝi al la reaktiviĝanta diskutlisto pri Terminologio per senteksta mesagxo al ĉi tiu adreso: terminologio-subscribe@yahoogroups.com. (Vidu ankaŭ ĉapitron 4.)

1.3 Simpozio pri interkultura komunikado

La Akademio de Esperanto, kunlabore kun la svedaj profesoroj *Sture Allén* kaj *Sven-Göran Malmgren* (ambaŭ Universitato de Göteborg) kaj subtenita de la Sveda Akademio de Sciencoj, okazigis la 2-an kaj 3-an de aŭgusto 2003 en la Universitato de Gotenburgo internacian simpozion kun la kadra temo “Interkultura Komunikado” (*Communication Across Cultural Boundaries*). Ĝin preparis kaj gvidis *prof. Christer Kiselman*, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto. La laborlingvoj estis la angla kaj Esperanto. La Sveda Akademio estis fondita de la reĝo Gustavus III en la jaro 1768 kaj kompetentas pri la elekto de nobelpremioj. 50 partoprenantoj sekvis jenan programon :

1.4. Pri eŭropa lingvo-politiko en la Parlamentejo de Bruselo

La 6-an de majo 2003 en la konstruaĵo Henry Spaak (la domo de la Eŭropa Parlamento) en Bruselo okazis kolokvo pri la eŭropa lingvo-politiko.

Gi estis la dua siaspeca (la unua okazis 29.9.1993, vidu IpI 6-7) kaj kunvenigis ĉ. 80 personojn, inter ili parlamentanoj, tradukistoj, interpretistoj kaj aliaj lingvo-politikaj fakuloj. La aranĝon preparis precipe *Michael Cwik* kaj *Alain Delmotte*. Pri planlingvoj prelegis d-roj *Věra Barandovská-Frank* (en Esperanto) kaj *Detlev Blanke* (en la germana). La prelego de Barandovská-Frank estis interpretita en la francan de esperanto-parolanta tradukisto de la Eŭropa Komisiono (*Angelos Tsirimokos*) kaj de aliaj interpretistoj el la franca en la germanan kaj anglan. La planlingva temo estis lerte enplektita en la kultur- kaj lingvopolitikan kadron de la simpozio. La tekstojn de la prelegoj, bazajn dokumentojn kaj la finan rezolucion oni trovas sub : www.cwik-online.net.

1 Seite

2 Prilingva ekspozicio kun sekcio pri planlingvoj en Graz

La ekspozicio "*Der Turmbau zu Babel*" (La Babela turo) en la Kastelo Eggenberg apud la aŭstria urbo Graz, ĉi-jare (4.4.-4.10.2003) allogis multajn vizitantojn. La ekspozicio estis dediĉita al la origino kaj multeco de lingvoj. Ĝi uzas ĝuste la Babelturon kiel elirpunkton por prezenti intelektan vojaĝon riĉa je disbranĉiĝoj. La ekspozicion preparis la arthistoria muzeo de Vieno (Kunst-historisches Museum) kunlabore kun aliaj konataj institucioj (inter kiuj la Aŭstria Nacia Biblioteko de Vieno kun sia kolekto pri planlingvoj [Internacia Esperanto-Muzeo]).

La Graza ekspozicio prezentis tri fokusojn: Arto kaj arkeologio estas kvazaŭ enkonduko. Elirpunkto estas kompreneble la Babelturo, reprezentata de la pentraĵo de *Pieter Bruegel* la pli aĝa, el la deksesaj jarcentoj. Kelkaj dek pentraĵoj ekde la deksesaj ĝis la dudekaj jarcentoj konfirmas la ĉarmon de la temo ĝis nun. Ne mankas dokumentoj kaj fotoj pri arkeologiaj esploradoj en Babilono pri konstruaĵo, kiu fakte starigis la miton pri la "ĝisĉiela turo".

En la dua sekcio pluraj arkeologiaĵoj resumas la historion de skribo. Fine, aparta sekcio enkondukas al la lingvoj (ne nur hindeŭropaj) pere de tri specoj da objektoj. Unue temas pri mekanikaj iloj, inter kiuj ekzemple spektrogramoj por "vidi" voĉon, surbendigiloj por aŭdi la tonojn de la ĉina lingvo, komputilaj programoj por maŝina tradukado de tekstoj. Due, videblas priskribaj tabeloj pri temoj kiel la pra-lingvoj, rilatoj inter lingvo kaj socio aŭ inter lingvo kaj nacio, lernado de lingvo fare de infanoj, la endanĝerigitaj lingvoj.... Fine, multnombraj objektoj rekte rilatas al la historio de lingvistiko, ekzemple la libro pri la kompara konjugacio en hindeŭropaj lingvoj de *Franz Bopp*, konata kiel la "unua libro" de tiu-ĉi fako.

Planlingvoj havis etan sed interesan lokon. Taŭga tabelo prezentis enkondukajn klarigojn pri celoj kaj rezultoj de lingvoplanado (kvankam mankas mencio de

interlingvistiko kiel aparta scienco) kaj prezentas Esperanton kiel sukcesan lingvon nun "parolatan de pli ol duonmiliono da homoj".

Resumas la temon dudek objektoj, ekvilibre elektitaj, kiuj celas la tutan historion de la moderna lingvoplanado (inkluzive aspektojn ne nur sciencajn, ekz. la uzon de planlingvoj en reklamiloj).

Volapuk-on reprezentas manskribita gramatiko de *Schleyer* mem, kaj reklama afiŝo por vino. Occidental-Interlingue kaj Interlingua reprezentas du lastatempaj revuoj, Idon reklamaj bildetoj pri ĉokolado. Videblas krome la unua gramatiko de Esperanto en la germana lingvo de 1887; kajero de la sekretario de *Tolstoj* kun korektoj de *Lidija Zamenhof*; afiŝo de la Universala Kongreso de Esperanto en Vieno; manskribita revuo por militmalliberuloj el Aŭstrio-Hungario en rusa koncentrejo dum la unua mondmilito; kaj Asteriks en Esperanto.

Originalan kaj eĉ humurplenan eseon pri planlingvoj verkis *prof. Otto Back* por la katalogo:

Back, Otto (2003). Erfundene Sprachen. En: Seipel, Wilfried (2003, Eld.): Der Turmbau zu Babel. Ursprung und Vielfalt von Sprache und Schrift. [Ausstellungskatalog]. Wien: Kunsthistorisches Museum/ Skira, Vol. II, p. 267-269, 271. (Ilustraĵoj pri la temo de planlingvoj, plej ofte kun komentoj de Otto Back, krome troviĝas sur la paĝoj 336-338, 341-345

(Laŭ teksto de Giorgio Novello)

3 Jubileo de Wilhelm Ostwald (1853-1932)

Menciindas kelkaj aranĝoj kaj eldonaĵoj lige al la 150-a naskiĝjubileo de la germana nobelpremiito pri kemio kaj fondinto de la moderna scienco pri koloroj, *Wilhelm Ostwald* (vidu ankaŭ la bibliografion de la verkoj de Ostwald en Ipl 37).

3.1 Konferenco de Idistoj omaĝe al Wilhelm Ostwald

De la 8-a ĝis 12-a de aŭgusto 2003 en la iama familia sidejo de Ostwald en Großbothen (ĉe Leipzig) membroj de la Germana Ido-Societo (prezidanto *Frank Kasper*) okazigis konferencon en Ido. Ĝin partoprenis ĉ. 30 personoj. Estis

laŭtlegita prelego de la prezidanto de “Uniono por la Linguo Internaciona (ULI)”, *Günter Anton* pri la temo “L’agado di profesoro Wilhelm Ostwald por la Linguo Internaciona Ido” (pri la konferenco vidu: www.geocities.com/idojc/ostwald-agado.html, 7.12.03). La kompleta teksto de la prelego aperis sub www.geocities.com/Athens/Forum/5037/ostwald-agado.html, 7.12.03). En la gazeto „Neues Deutschland“ Berlin, 16./17.8.03) aperis tutpaĝa artikolo pri la konferenco.

Jen la unua parto de la teksto en la planlingvo Ido :

La internaciona Ido-konfero 2003 ne hazarde eventas en la germana urbeto Großbothen. Ol esas dedikata a la 150ma aniversario dil nasko di prof. Wilhelm Ostwald, un di la maxim eminenta membri dil Delegaciono por la Adopto di Linguo Internaciona e do en certena grado un di la patri di Ido e pioniro por la developado e difuzado di nia linguo.

Ostwald, qua naskis ye la duesma septembro 1853 en Riga, divenis eminenta kemiisto ed exploris sucesoze en la domeno di fizikala kemio, speciale lu okupis su pri la teorio di ioni. Pro lua labori pri katalizo il recevis la Nobel-premio en 1909. Il karakterizesis kom multalatera ciencisto. En la granda e moderna urbo Leipzig Ostwald exploris e docis en la universitato ed ibe il havis sua maxim sucesoza e fruktifanta labor-periodo. Il mortis ye la 4ma aprilo 1932 en Großbothen, ube il trovabis sua domicilio en la ruo-domo "ENERGIO".

Valoras okupar su plu multe pri Wilhelm Ostwald en la memoreyo o heme. Tre valoroza esas lua devizo: *"Disipez nula energio, profitez ol!"*. Co devus esar anke nia devizo en nia agado por Ido.

Hike me volas traktar speciale la agado di Prof. Ostwald por la mondo-linguo, nam ca esas nia specala domeno. Segun mea informi, ca agado remarkeble komencis e developis depos la yaro 1901. Per artikli e diskursi Ostwald sustenis la ideo di mondhelplinguo. Olua avantajin il vidis speciale por la scienci, nam por la lektado di artikli e laboruri di exterlandana kolegi, por la korespondo e por konferi, qua tre faciligesus per komuna linguo por cienco. Il atencigis a la fakto, ke la linguala desfacilaji ankore kreskus, se ankore plu multa populi partoprenus

la ciencala esplori. Il skribis en 1906, ke la internacioneso di scienci demandas internaciona linguo. La neceseso di komuna linguo di cienco trovis sustenanti, ma la majoritato propozis moderna linguo, ante omno l'Angla. Ostwald atencigis a la fakti, ke la vivanta lingui ne posedus la necesa interna logiko, e ke nula naciono esus pronta admisar ad altra naciono la grand avantajo dil mondovasta difuzado di lua linguo. Pro to il demandis linguo auxiliara, qua kontentigus la bezoni dil omnadiala vivo e di cienco e qua esus facile lernebla.

Quale altri, komence Ostwald sustenis Esperanto. Co esas dokumentizita por la yari 1905 e 1906 (en altra literaturo me lektis 1903) kande il agis kom "interkambio-profesoro" (germane AUSTAUSCHPROFESSOR) en Usa. Ja dum la pasajo de Europa ad Amerika il diskursis pri la mondlinguo.

En sua libro "Lebenslinien" (en Ido "Vivo-linei"?) il skribis: "Me lore ankore konsideris la artificala linguo Esperanto kom la maxim bona existanta solvo dil tasko. Pro to me piktis en la diskurso per maxim vivaca kolori la grandega progresi, quin experiencus la homaro per la endukto di tala helplinguo."

En Usa il pluse propagis Esperanto e per sua inciti fondesis diversa Esperanto-klubi. Segun Ostwald fondesis plu kam cent dum sis semani...

3.2 Novaj kontribuoj pri Ostwald kaj la planlingvoj

En la revuo „Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e.V.“ jam aperis kelkaj gravaj artikoloj pri la rilatoj de Wilhelm Ostwald al la ideo de internacia lingvo, aparte al Ido.

Jen la ĝis nun publikigitaj titoloj:

Blanke, Detlev (1999): Wilhelm Ostwald, Ido und die Interlinguistik. En: Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e.V., 4 (1999) 1: 32 – 69

Hansel, Karl/ Wollenberg, Fritz (1999): Aus dem Briefwechsel Wilhelm Ostwalds zur Einführung einer Weltsprache. En: Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e.V., Sonderheft 6, Großbothen

Wollenberg, Fritz (1997): Der Briefwechsel Wilhelm Ostwalds zu interlinguistischen Problemen. En: Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e.V., 2. (1997)2: 26-44

Lastatempe aldoniĝis:

Ostwald, Wilhelm (2002a): Die Weltsprache – Auszüge aus den Lebenslinien. En: Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e.V., 7(2002)1: 4-31

Ostwald, Wilhelm (2002b): Über die Grundsätze, welche für die Konstruktion künstlicher Sprachen maßgebend sind. En: Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e.V., 7(2002)1: 32-41

Hansel, Karl (2002): Gedanken zum vorstehenden Beitrag. En: Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e.V., 7(2002)1: 41-42 (= komento al Ostwald 2002b)

Sobczyńska, Danuta / Czerwińska, Ewa (2002): Vereinheitlichung der Wissenschaft und die internationale Wissenschaftssprache – Über die in Vergessenheit geratene Idee Wilhelm Ostwalds. En: Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e.V., 7(2002)1: 43-73

La biografio:

La supre menciitaj titoloj Ostwald 2000a kaj 2000b estas represoj el lia ampleksa biografio “Lebenslinien“ (vivlinioj), kiu antaŭ nelonge reaperis. Ĝi estas komentita kaj prinotita de *d-ro Karl Hansel*, direktoro de „Ostwald-Gedenkstätte in Großbothen“ (memorejo kaj muzeo pri Wilhelm Ostwald):

La malnova eldono kun la ĉapitro pri mondlingvo:

Ostwald, Wilhelm (1927): Lebenslinien - eine Selbstbiographie. Dritter Teil: Gross-Bothen und die Welt 1905 – 1927. Fünftes Kapitel: Die Weltsprache (p. 141 -181). Berlin: Klasing

La nova eldono de la kompleta bibliografio:

Ostwald, Wilhelm (2003): Lebenslinien - eine Selbstbiographie. Nach der Ausgabe von 1926/27 überarbeitet und kommentiert von Karl Hansel.

(Abhandlungen der Sächsischen Akademie der Wissenschaften zu Leipzig. Mathematisch-naturwissenschaftliche Klasse. Band 61). Leipzig: Verlag der Sächsischen Akademie der Wissenschaften zu Leipzig/ In Kommission bei S. Hirzel Stuttgart/Leipzig, 626 p. (kun 2380 notoj de Karl Hansel, personindekso, lokindekso, 13 p. fotoj), (ISBN 3-7776-1276-6).

Mendebila ĉe: Hirzel, Birkenwaldstr. 44, 70191 Stuttgart. Prezo 104 EUR.

3.3. Kompleta bibliografio de la verkoj de Wilhelm Ostwald

Okaze de la jubileo de Wilhelm Ostwald la „Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e.V.“ (societo por Wilhelm Ostwald en Großbothen) eldonas en tri volumoj la kompletan verkaron de la nobelpremiito:

1. Memstaraj kaj nememstaraj verkoj 1875-1932, inkluzive represoj, reeldonoj kaj tradukoj
2. Prelegoj kaj recenzoj
3. Tradukoj, editoraĵoj (eldonado de serioj de revuoj, traktaĵoj kaj libroj), unuopaj leteroj kaj korespondaĵoj, krome publikaĵoj el la postlasaĵo. Kompletigoj al la volumoj 1 kaj 2.

Jam aperis volumo 1:

Altena, James / Hansel, Karl (2002): Wilhelm Ostwald. Gesamtschriftenverzeichnis. Band 1. Selbstständig und unselbstständig erschienene Schriften, deren Neuauflagen und Übersetzungen 1875-1932. En: Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e.V., 7(2002) Sonderheft 14, 212 p. (indeksartikoloj: Weltsprache (mondolingvo) : p. 66, 69, 73, 80, 87, 89, 107, 129, 130, 170; Esperanto: 71, 74; Hilfssprache (helplingvo): 71, 74, 87; Ido: 94; mondolinguo (en Ido) 184).

Krome vidu sub 1.2.2 la prelegon de *Detlev Blanke* pri Wilhelm Ostwald kadre de la 88-a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo.

4 Vortaroj kaj fakvortaroj

Dum longa tempo mankis iom fidinda superrigardo pri vortaroj en Esperanto.

Antaŭ nelonge aperis du gravaj bibliografioj, kiuj forigis tiun mankon :

4.1. La bibliografio de Ockey kompletigita

Ĝis nun la plej kompleta bibliografio de vortaroj de Esperanto - post tiu de Stojan - estis jena:

Ockey, Edward (1982): A Bibliography of Esperanto Dictionaries. Bibliografio de Vortaroj. Banstead 1982 (Manuskripto).

Geoffrey Sutton prilaboris kaj parte aktualigis tiun bibliografion por elektronika eldono kun la titolo "Bibliografio de vortaroj kaj terminaroj en Esperanto, 1887-2002". En ĝi estas listigitaj E-vortaroj kaj terminaroj (fakvortaroj), publikigitaj dum la tuta vivodaŭro de nia lingvo - entute 1079 titoloj. Sendube la listo ne estas kompleta, sed momente la plej plena.

La Bibliografio estas trovebla ĉe la adreso

<http://uea.org/dokumentoj/bibliografioj.html> kaj estas prezentita en tri formatoj - HTML-versio, kiun oni povas konsulti rete, PDF-versio kaj RTF (arkivigita) - kiujn oni povas elŝuti kaj konsulti laŭnecese en propraj komputiloj.

En la sama paĝo oni trovas apartan *Bibliografion de E-terminaroj*, aperintaj en 1980-2002. Ĝi estas pli oportuna por tiuj, kiuj simple serĉas specifajn fakajn terminarojn, ĉar ĝi disponigas titolojn, ofte reale troveblajn en libroservoj. Krome, post pluraj titoloj estas aldonitaj hiperligiloj, pere de kiuj oni povas transiri al la tekstoj de la terminaroj en diversaj E-retejoj. La bibliografio estis kompilita de *Ĵeromo Vaŝe* kaj enretigita de *Dirk Bindmann* (vidu la sekvan artikolon).

el [Gazetaraj komunikoj de UEA n-ro 168]

4.2. Elektronika Bibliografio de fakvortaroj en Esperanto 1980-2002

Ĵeromo Vaŝe, Parizo (jvachey@free.fr)

Celo

Je 2002-05-30 en la interreta diskutlisto terminologio-1 (1) *Renato Corsetti* proponis enketon pri terminaroj. La celo estis disponigi klaran informon pri ekzistantaj fakvortaroj en la lingvo internacia. Tiatema verko eldoniĝis en 1982 (2) kaj estis tiam survoje al republikigo. Tial la reta iniciato limiĝis je freŝaj referencoj el 1980 ĝis 2002.

Informfontoj

Sepo da homoj provizis dekon da taŭgaj referencoj. Saman kvanton mi trovis en la propra libraro. Ĉiuj ceteraj venis de rete atingeblaj katalogoj. Tre efikaj estis la retservo de IEMW (3), tiu de la germana Esperanto-biblioteko en Aalen (4), kaj la reta librovendejo de UEA (5). Tiu de FEL (6) entenas interesajn erojn sen sufiĉaj informoj por bibliografia laboro. Al la referencoj pri paperaĵoj aldoniĝis priskriboj de dekkvino da interretaj terminaroj.

La 4-a eldono de la listo (7) sume entenas 115 noticojn.

Kompleteco kaj ĝusto de referencoj

Kolektado de referencoj sen ebla enmanigo de la libroj certe kaŭzis erarojn kaj mankojn.

La serĉataj informoj estis kutimaj bibliografiaĵoj (aŭtornomoj, titoloj, eldonlokoj, -kompanioj kaj -jaroj, nombro de paĝoj, ISBN kaj ceteraj) plus kelkaj por terminaroj signifaj karakterizoj (lingvoj, enesto de difinoj, nombro de kapvortoj). La lastaj estis malpli facile troveblaj.

Retaj terminaroj ofte ne mencias unuan daton de enretigo, nombron de kapvortoj aŭ similajn bazaĵojn.

Fakoj

Mi enfakigis la referencojn laŭ indikoj de la titoloj. Tio montras superregon de kelkaj fakoj pli nomenklaturaj (botaniko 12 eroj, birdoscienco 8.) aŭ ial popularaj (matematiko, komputiko, juro po 6). Male, fakoj ekzemple industriaj (hidraŭlika 3, peltindustrio, transporto, telekomuniko po 1) aŭ belartaj (muziko 2, fotarto 1) ne tiom abunde aperas.

Lingvoj

Krom en Esperanto, la terminaroj proponas kapvortojn precipe en grandaj aŭ mezgrandaj eŭropaj lingvoj (angla 63, franca 40, germana 39, rusa 17, sveda 15, nederlanda 15, hispana 14, ĉeĥa 12, itala 11, portugala 10), sekvarange en orientaziaj lingvoj (ĉina 9, japana 8).

Tiun prezenton eble influas ĉefe eŭropaj informfontoj, nome retaj katalogoj farataj en Aŭstrio, Germanio, Nederlando.

Tio probable ankaŭ montras, ke okazis pli da du- aŭ plurlingva terminara laboro pri vaste parolataj aŭ monde influaj lingvoj.

Iuj malfortoj jen estas kompreneblaj pro la geografio de Esperantio (araba 1), jen restas pli enigmaj (korea 1).

Kvalito de terminaroj

Sen konsulto de la verkoj ilia kvalito ne facile takseblas. Malgraŭ la mankoj en trovitaj informoj oni vidas, ke la unuopaj verkoj tre diversas. Iuj estas unuaŭtoraj memeldonaĵoj, aliaj estas patronitaj de faka asocio aŭ instituto. Iuj entenas kelkcent terminojn, aliaj plurajn milojn (fervojo, ĥemio, juro, medicino). Se juĝi laŭ la interretaĵoj, diversas ankaŭ la lingva kvalito de proponataj terminoj. Malmultas la eldon-serioj kaj probable la komunaj terminologiaj normoj.

Literaturo

- (1) La diskutlisto terminologio-l refondiĝis je 2003-03-04 kiel listo terminologio: <http://groups.yahoo.com/group/terminologio/>
- (2) A bibliography of esperanto dictionaries = bibliografio de vortaroj / ockey edward. - world language books, 1982. - 236 p.
- (3) katalogo de IEMW, Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm>
- (4) Katalogo de Germana Esperanto-biblioteko en Aalen: <http://www.fh-aalen.de/sge/fb-e-ti/mitarb/umaier/Esp-De/Bib-AA/Einstieg.htm>
- (5) Katalogo de UEA, Universala Esperanto-Asocio: <http://www.uea.org/katalogo/>
- (6) Retbutiko de FEL, Flandra Esperanto-Ligo: <http://retbutiko.esperanto.be/>
- (7) Terminaroj 1980-2002, 4a eldono, 2003-05-01, http://uea.org/dokumentoj/terminaroj_1980-2002.html

Aktualiga aldono de la aŭtoro (19.11.2003)

Nun disponeblas la 5a eldono de "terminaroj ekde 1980" je:

http://uea.org/dokumentoj/terminaroj_ekde_1980.html (*Dirk Bindmann* glatigis kaj enretigis ĝin.)

Kompare al la antaŭa eldono:

- La titolo ŝanĝiĝis de "terminaroj 1980-2002" al "terminaroj ekde 1980" pro la apero de referencoj el 2003
- La nombro de referencoj kreskis de 115 al 132.
- La nombro de lingvoj restas 37.
- La nombro de fakoj kreskis de 57 al 64.
- La nombro de menciitaj retaj terminaroj kreskis de 19 al 31.

Kelkaj faknomoj ŝanĝiĝis por akordiĝi aŭ kun la "Bibliografio de vortaroj kaj terminaroj en Esperanto" farita de *Ockey kaj Sutton*, aŭ kun la fakoj de "Reta Vortaro" (Revo):

bibliotekoscienco -> biblioteka scienco

birdoscienco -> ornitologio
botaniko kaj forsto -> botaniko kaj hortikulturo
ekologio -> naturprotektado
ekonomiko -> ekonomiko kaj komerco
fervojo -> fervojoj
fotarto -> fotografio
geodezio -> geodezio, topografio
hejma vivo -> dommastrumado
konstruteĥniko -> konstrutekniko
muzescienco -> muzeologio
peltindustrio -> peltoj
scienco-teĥniko -> scienco-tekniko
telekomuniko -> telekomunikoj
transporto -> trafiko
ĥemio -> kemio, biokemio

Ĵeromo Vaŝe

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED)
ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.: ++ 49-30-54 12 633,
fakso: ++ 49-30-54 56 742, dblank.gil@snafu.de. Mendojn oni direktu nur al UEA,
kontribuojn nur al la redaktoro, per retroŝto aŭ sur diskedo. Artikoloj sen indiko
pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi
pruvekzempleron. Bibliografiatas ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.
Pri CED vidu: www.esperantic.org. Materialoj ĉiam bonvenaj. ISSN 1385-2191